# EKO 2021
## Esperigaj Komunikoj

Je via servo tra ok jaroj, depost 2013
2020: rekorda jaro: kun 60 komunikoj
Subtene al la loka, landa, faka kaj regiona agado

EKO 2021-58 sendita el Budapeŝto la 28an de decembro – **LA LASTA DE 2021**


*Al: Komitato, sekcioj kaj aktivuloj de ILEI, Landaj kaj Fakaj Asocioj de UEA (aliĝintaj kaj ne). Plie al la Komitato, Konsilianoj, regionaj komisionoj de UEA, TEJO-estraro, gazetaro, partoprenintoj en iuj AMO-seminarioj, aliaj listoj kaj unuopuloj. Pli ol 1500 ricevantoj. Kun plusendoj pli ol 2000.*

Por tuja uzo kaj plia diskonigo inkluzive de la alkroĉaĵoj kun indiko de fonto: EKO de ILEI kaj UEA

# AMO 81 en Togolando – la dua tago



La subtemoj tiutagaj (la 24a de decembro) estis :

- Aplikado de Esperanto en la ĉiutaga vivo de la homo
- Valoraĵoj kulturaj niaj
- Esperantujismo
- Vojoj al sukceso
- Esperanto-organizaĵoj
- La bulonja deklaracio

S-ro GBEGLO Koffi enkondukis la subtemaron La partoprenantoj rakontis kiel ili nun aplikas Esperanton en sia ĉiutaga vivo. El la rakontoj, oni povis noti la kutimajn aferojn, kiel interrilatado homa, uzado de Esperanto en familio, interŝanĝoj de ideoj, legado de libroj, partopreno en Eo-aranĝoj, aparteno al Eo-organizaĵoj, ktp. Neniu povis mencii, ke li akiris laboron pere de Esperanto, kvankam tio ja ekzistas en Togolando, ĉar pere de Esperanto estas dungita la unua pedagogia direktoro de Instituto Zamenhof. Tiam la partoprenantoj tuj rimarkis, ke granda abismo faŭkas inter Esperanto kaj dungebleco . S-ro Koffi emfazis, ke nun estas la momento krei laborojn pere de Esperanto. Eble la valoraĵoj kulturaj povos kontribui en tio.

S-ro SAGBADJELOU Kokou (sur la foto supre) parolis pri la valoraĵoj kulturaj niaj. Lau li, afrikanoj, kiel ankau aliaj popoloj, havas proprajn kulturaĵojn: manĝostilon, vestadon, nomprenon, ktp. Montriĝis, ke afrikanoj forĵetas siajn kulturaĵojn por adopti tiujn de aliaj popoloj. Li vekas la afrikanojn, ke iliaj kulturaĵoj estas TRE VALORAJ. Certe ankaŭ Esperanto havas siajn kulturaĵojn.



Esperanto-organizaĵoj ekzistas multaj. S-ro KEDEGADZI Ezekiel (sur la apuda foto) prezentis Esperanto-Organizaĵojn : UEA, ILEI, SAT, La Esperanta Civito, MAS, TEJO, UMEA, IKEF, IFEF, UETA, ktp. Al kiuj el tiuj organizaĵoj apartenu esperantistoj kaj kiuj el ili zorgas pri Esperanto en Afriko ? Ĉu ne la Afrika Komisiono de UEA estas asocio de esperantistoj afrikaj ? Tiaj demandoj aperis dum la prezentado de la temo. Klarigoj abundis tiam de la prezentanto kaj ankaŭ de la partoprenantoj. Ĉiuj esperantistoj estas liberaj aparteni aŭ ne al Esperanto-organizaĵoj.

Kompilita el multe pli ampleksa raporto, kiu eniros la arĥivon de AMO.

# Nova epoko por la KER-ekzamenoj

Multaj el la membroj de edukado.net informiĝis lastatempe pri la KER-ekzamenoj. Mia respondo estis, ke ni laboras pri nova etapo, venos ŝanĝoj, nova nivelo, moderna formo. En la nuna novaĵo vi povas legi pri ili kaj komenci plani por 2022 ekzameniĝi aŭ organizi ekzamenojn.

Jen la paĝo kie vi povas trovi la detalojn https://edukado.net/novajhoj?id=864

Katalin Kovats, redaktoro

# Vinilkosmo daŭre distras nin el Aŭstralio

Spektu kaj ĝuu la koncertojn programitajn dum la 2a Virtuala Kongreso de UEA en julio 2021 partnere kun EUROKKA/ Vinilkosmo ĉi tie en nia blogo

https://www.vinilkosmo-mp3.com/eo/blogo/231-koncertoj-programitaj-dum-la-2a-virtuala-kongreso-de-uea.html

Vidu ankaŭ: https://youtu.be/8HDf86yVeb0

En decembro 2021 aperas oficiale ĉe VINILKOSMO la bita albumeto "Amo kaj Perforto" de "Ekde tiam". Tio estas alternativa sintezpopa bando, fondita de geedzoj Peter & Jo Johns en 2017. La paro mem faras laŭeble plimulton de la muzikpreparado - ili kune verkas kantojn. Petro ludas la drumon, aranĝas, registras kaj miksas, dum Jo ludas sintezilon, kantas, kaj desegnas afiŝojn kaj album-kovrilojn. Ili koncertis unue ĉe la Aŭstralia Kongreso de Esperanto en Adelaido en 2019, kaj ankaŭ tie prezentis pri la historio de elektronika muziko.

La unua versio de la albumeto "Amo kaj Perforto" aperis kiel memeldono la 1-an de decembro 2020. Komencita en Melburno, ĝi vojaĝis kun la bando, kiu translokiĝis al Brisbano ĝuste antaŭ la pandemio, kaj estis parte miksita dum la trud-izoliĝo. La kvar kantoj estas diversstilaj, kaj kunigas akustikan drumon kun elektronika sintezilo. La albumeto povas esti dividita en du temojn, laŭ la nomo, kun la unuaj du kantoj pri amo kaj la duaj du pri perforto.

Ĝia oficiala apero ĉe Vinilkosmo okazas unu jaron poste kaj ĝi disponeblas ĉi tie :

https://www.vinilkosmo-mp3.com/eo/popo-roko-hiphopo-elektronik/ekde-tiam/1-amo-kaj-perforto.html .

En tiu retpaĝo spekteblas ankaŭ muzikvideo de la albumo.

Floreall Martorell, (Flo0 -sendita de Laszlo Szilvassi

# Litova kongresa filmo

Bonvolu spekti filmon de Gražvydas JURGELEVIČIUS pri la 55-a Kongreso de Litova Esperanto-Asocio kaj la aranĝo Zamenhof-Tagoj 2021

https://www.youtube.com/watch?v=LJfsPUppBuU

Povilas JEGOROVAS




# Portugala festado

La 11an de decembro oni festis esperante en UNICEPE (Oporto) - https://www.unicepe.pt/. Mi sendas la afiŝon/programon kaj la ligilon prie en la eventa servo https://eventaservo.org/e/663ade. Kelkajn programerojn eblos spekti ankaŭ virtuale.




# Turka Stelo elstaras ĉe MONA

Aperis la nova numero de nia revueto "Turka Stelo". Tiun amotoran, simplan revueton ni povas pliriĉigi kune per viaj kontribuaĵoj. Ni atendas viajn leterojn pri viaj opinioj kiel nia leganto, Plue, se vi volas sendi

kontribuaĵojn  en Esperanto, tio ĝojigus nin. Verkoj pri politiko, religio ktp ne estos akceptitaj. Bonvolu sendi al ni tekston pri kulturo, naciaj rakontoj, viaj rememoroj ktp. Malnovaj numeroj troviĝas en nia retpaĝo sub menuo "Dergi/Revueto". La lasta numero estas rekte legebla en la reto.

https://esperantoturkiye.wordpress.com

Vi ankaŭ povas aboni nian ret-paĝon por ricevi sciigojn pri niaj novaj blogaĵoj. Por tio iru en la suba parto de  la dekstra menuo.

# UN denove kaj fideble raportas

**Numero 55 – novembro - decembro 2021**

- Reprezentanto de UEA Francis Hult ĉefparolis en Pintkonferenco de NROj
- TEJO atingis konsultan statuson ĉe UN
- Komitato de NROj pri lingvo kaj lingvoj fondiĝis
- Unesko jubileas
- Reorganizita UEA-teamo ĉe UN-Ĝenevo
- Multlingvismo en Eŭropo
- Parolantoj de Esperanto laboras por toleremo kaj interkompreno

# Esperanto en albana televido

La kvaran de decembro *TV SCAN Albania* aranĝis kaj elsendis 25-minutan programon pri Esperanto en Albanio. Intervjuiĝis 15-jara gimnaziano Juri Andoni, la plej juna esperantisto albana, tradukinto de la novelo de Leif Nordenstorm “Arne la ĉefido” kun albana titolo “Arne eta vikingo”. Poste intervjuiĝis mi. Eventuale oni povus skribi pri la evento en revuoj. Estus bonvena salutmesaĝo al fraŭlino Jenida Vladi de TVSCAN kiu faris la elsendon tre alloga je retadreso

Jenidavladi@hotmail.com

Bardhyl Selimi

# ILEI en Francio progresas kun nova gvidanto

Jen por ILEI-FR funkcias retlisto kun 115 registritaj retadresoj
https://esperanto-france.org/sympa/info/ilei-francio
kvankam ĝi ne estas tre aktiva.

Laŭ mi scio, en Francio kelkaj aktivaj profesiaj instruistoj (ekz. Emmanuel DESBRIERES) provos enkonduki Esperanton ĉe sia lernejo sed ĝenerale temas pri nedeviga fako maksimume unu horon/semajne. Pri multlingva akcelilo, ĝi ebligas 60 horojn da instruado do 2 horojn/semajne dum lerneja jaro.Sed mankas profesiaj instruistoj por uzi ĝin, eĉ mankas homoj por la agado “Unu leciono pri Esperanto por ĉiu lernejano”!

Por kompreni la sistemon **sympa,** vizitu la paĝon sympa de eo FR
https://esperanto-france.org/sympa (la interfaco estas en la franca) malfermu konton kaj vi vidos la listojn kiuj estas libere alireblaj (interalie tiun de ILEI-Francio).

Vizitu ankaŭ retejon: https://www.sympa.org/. Sympa estas libera programo do oni rajtas libere elŝuti ĝin por instali propran servilon sympa por sia uzo kaj elekti la agordojn de sia servilo. Nuntempe inter la lingvoj por interfaco Esperanto mankas, sed ĉar estas libera programo, oni rajtas kontribui por aldoni lingvojn.
Se vi deziras aliĝi nur al la listo de ILEI-Francio, kaj ne deziras malfermi konton ĉe sympa de eoFR, mi povas aldoni vin. Aliĝo al la listo de ILEI-Francio estas libera; la sola regulo estas skribi nur pri temoj de ILEI en Francio (kutime oni interŝanĝas en Esperanto).

Didier Janot

# UEA aktivas ĉe UN

Jen raporto pri la unua tago de la Ĝenerala Asembleo de CoNGO (Konferenco de Neregistaraj Organizoj en Konsultaj Rilatoj kun Unuiĝintaj Nacioj), de kies estraro UEA estas membro.

https://unesperante.wordpress.com/2021/11/30/la-rolo-de-civila-socio/

Reprezentantoj de UEA kaj TEJO partoprenas la asembleon. Ni danku pro la raporto al nia teamo, inter ili al nia honora prezidanto, H. Tonkin, kiu gvidas nian agadon pri Eksteraj Rilatoj, kaj al Rafael Lima, i.a. agnoskita de UEA pro sia elstara agado kaj komisiito de UEA pri la paĝo UNEsperante (oni sekvu ankaŭ ĉe Twitter @UNEsperante: https://twitter.com/unesperante.

Fernando Maia Jr.

## SAT jubilee organizis studtagon

La studtago kiun ni organizias la 17-an de decembro okaze de la centjariĝo de SAT okazis en Parizo ĉe Campus Condorcet. Lingvoj estis franca, angla kaj esperanto. Ĝin fermis memprezentoj de aktualaj aktivuloj, ĝenerala diskuto kaj amika aperitivo.  Pliajn informojn: https://sat-centjara.sciencesconf.org/

Pascal Dubourg Glatigny

## Hispanio denove kaj persiste servas nin

Hispana kristnaska kanto " Venas oldulino", kantita de Kvaropo Sinkopo.

https://youtu.be/_70m0mrLBKo

(Vvi estas multe pli ol tio, kion vi vidas)
https://youtu.be/Dd8HBO575mc

mga

**Remembrigu vin nun al UEA, ILEI, TEJO, aliaj internaciaj asocioj, via landa asocio kaj loka klubo.**
**Ni kresku en 2022 !**

========= vortoj:  1270 =========

Ĉi tiu komuniko estas disponebla laŭ la permesilo Krea Komunaĵo Atribuite Samkondiĉe 4.0 Tutmonde.
Por pli da informoj vidu ĉe: <https://creativecommons.org/licenses/by-sa/4.0/>.

Aperintaj komunikoj legeblaj kaj elŝuteblaj ĉe: http://aktivulo.net/eo/content/komunikoj-pri-agado. La prezento estas ĝisdata ĝis la **17a aŭgusto 2021** (per EKO 2021-34). Vidu ilin laŭjare, kun klaraj enhavaj indikoj por ĉiu jaro depost 2014.

**ALDONU VIN:** Skribu al <stefan.macgill<ĉe>gmail.com>. Neniu alira kondiĉo aldone al valida retadreso. Malferma al Aligitaj Membroj, eksmembroj, neniam-membroj, klingonuloj, volapukistoj, atistoj, itistoj, ujistoj, iemuloj, Duolingintoj, ktp.

**SUBTRAHU VIN:** Skribu al la supra adreso. Donu vian nomon, retadreson, landon kaj (se eble) la grupon aŭ kialon por via ĉeesto en la ekspedolistoj.

**Servo subtenata de Universala Esperanto-Asocio kaj Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj**

ilei

**Helpantoj:**
Rob Moerbeek
Gbeglo Koffi
François
Lo Jacomo

**ENHAVO**

- AMO 81 – dua tago
- KER-estonto
- Aŭstralia muziko
- Albanio, Francio
- UN kaj CONGO